

Marie Hankel,  
Nia lingvo

Nia lingvo Esperanto  
donas helpon en la mond'.  
Ho, kreskadu la anaro  
de pacema granda rond'.  
Kaj fermiĝu per kompreno  
de l'malpaco ĉefa front',  
Nia lingvo Esperanto  
povas servi kiel pont'.

Ni ne perdu la kuraĝon,  
alta estas nia cel',  
Nur antaŭen! Nia stelo  
alte brilas en ĉiel'.  
Pro la lingvo Esperanto  
disvastiĝos granda hel',  
Ni ne perdu la kuraĝon,  
alta estas nia cel'.

Nia lingvo Esperanto  
disvastiĝas tra l' aer'  
Ĝis popoloj pli liberaj  
sin komprenos trans la ter'.  
Ni laboru ne laciĝe  
por la venko kun esper'.  
Nia lingvo Esperanto,  
tra la tuta ronda sfer'.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas MARIE HANKEL (nask. Dippe, \*1844-02-02 - †1929-12-15), publikigita 1907.*

*Arg-468-895 (2008-04-22 13:28:40)*

*Laŭ telefona informo de s-ro d-ro Wolfgang Schwartz (Finsterwalder Str. 7, D-01239 Dresden) de l' 21.04.2008 la poemo estas verkita de la poetino Marie Hankel en 1907.*